# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 7 Julio, 2013


*Kara Leganto, jam venis Julio – naskiĝmonato de nia kara lingvo, ĉar la 26an de Julio 1887 cenzuristo permesis eldoni la Unuan Libron. Ne forgesu dum tiu Tago de Esperanto (126-a datreveno) tosti je la prospero de la IL. Dankon.*

*Mi intencis skribi, ke ni ne haltu je bagatelaĵoj kaj movu antaŭen. Jam okazis nia tradicia evento – somera E-pikniko, pri kiu skizis d-ro Leszek. Fakte, ĝi estis ne loka, sed interŝtata. Pri aliaj okazintaĵoj en ĉirkaŭujo legu suben. Vivu ni, Esperantistoj!* –La Redakcio

## Tradicia Esperanta Pikniko



Nia tradicia somera pikniko ĉi-jare estis nemultnombra, sed sukcesa. Abundis bonega manĝaĵo, precipe bongustis la kokidaĵaro, rostita de Tanja. Ni ŝuldas multajn dankojn al ŝi. Dum la pikniko la vetero favoris la konversaciojn, ludojn kaj eĉ ni kantis diverslingve. Reveno al la antaŭa konvena piknikejo en Schiller Woods, kie okazis multe da aliaj piknikoj samtempe, rezultis je la kreskinta intereso pri nia Esperanto-evento inter la najbaraj fremdaj piknikintoj. Ĉarma 4-jarulo Davido-Armano aktive partoprenis kune kun la gepatroj. Surprize, de Nebraska alvenis por viziti nin samideano Terry kun sia juna filo Alekso. Ni multe ĝuis ilian partoprenon, danl'al kiuj nia evento fariĝis interŝtata. —*Les Kordylewski*

## RISKO: Nova Ludo de Edukado

Lastatempe la porinstruista portalo www.edukado.net (finance subtenata de ESF) lanĉis retan kvizludon RISKO. Jam la nomo sugestas, ke ne sufiĉas nur koni niajn lingvon, historion kaj kulturon, sed por sukcese "riskumi" necesas ankaŭ iom da strategio kaj bonŝanco.

Ĉiun tagon la ludantoj ricevas maksimume tri demandojn (kiuj varias hazarde de tago al tago) pri Esperanto: po unu pri lingvo, kulturo kaj movado. Nur tiuj, kiuj bone respondis al almenaŭ unu el la du unuaj demandoj, rajtos elekti halti, aŭ pluludi kun la ŝanco duobligi la poentojn aŭ perdi ilin. Se oni respondos bone la trian demandon, la poentoj duobliĝos, sed se oni respondos malĝuste, oni perdos la poentojn gajnitajn en tiu tago! La poentoj sumiĝos ĉiumonate, kaj fine de la monato la gajnintoj povos elekti el la proponitaj premioj. Estos plia premio por la absoluta gajninto de la tuta jaro. La premioj venas parte de la Fondaĵo Edukado.net, sed estas multaj asocioj, eldonistoj, aŭtoroj de libroj kaj diskoj, kiuj subtene al la ludo oferis siajn verkojn.

Jam la ludo vekis grandan intereson. La populareco de la ludo RISKO altigis enorme ne nur la vizitojn de la paĝaro, sed ankaŭ la nombron de aliĝintoj. Fakte, rapide post la apero de anonco pri la ludo ĉe lernu.net, edukado.net superis 3000 registritajn uzantojn!

La ludon elpensis Katalin Kovats, la redaktoro de la retejo, kaj la 1200 diversajn demandojn elpensis kaj enretigis ŝi mem kaj la dana kolego Mogens Rude Andersen. La demandoj ofte ne estas facilaj: citaĵoj, parigoj de aŭtoroj kaj verkoj, datoj kaj okazaĵoj, difino de vortoj, rekono de kantoj, misprononcitaj fonemoj, ktp. Pere de la ludo la paĝaro celis ne nur ludon kun valoraj premioj, sed ĉefe klerigan agadon. Ja ĉiun nokton, fine de la koncerna ludotago, ĉiu ludanto, kiu tion abonis, ricevas retmesaĝon pri siaj poentoj kaj la tiun tagon nesciitaj demandoj, sed sen respondoj. La ludintoj mem devus serĉi la ĝustan respondon por ke sekvafoje, se ili hazarde rehavos la saman demandon, ili povu respondi senriske. RISKO funkcios kontinue, tra monatoj kaj jaroj, kaj la redaktoro esperas grandnombran partoprenon. Ĉiu el vi estas bonvena riskumi en la LUDO-sekcio de www.edukado.net.

—*ESF*

# Woody Guthrie en Esperanto (5)

Tiu kanto bone montras solidarecon kun malriĉuloj. Mi ne scias, ĉu Woody Guthrie estis religiema. Se vi konas la Sanktan Biblion, vi certe ankaŭ legis la vortojn de Jesuo "Estas pli facile por kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio" (el Mateo 19:24). Sed la pesimista sono de tiu kanto je la fino ne bone kongruas kun la kristana kredo al la resurekto. Tiu aspekto tute mankas en la kanto de Woody Guthrie

*– Tradukis Klaus Friese, Germanio*

## *Jesuo Krist'*

*M: Jesus Christ (Woody Guthrie)*

Jesuo Krist' estis viro kiu
vojaĝis tra la land'
Laborema, kuraĝa hom'
Li diris al riĉul':
vian monon donacu nun!
Sed ili stiras Jesuon al Sia tomb'

Jes Jesuo estis hom',
per mano lignajist'
disciploj honestaj kun kuraĝ'
Sed un' perfindanto,
estis Judas Iskariota
Li gvidis Jesuon al Sia tomb'

Li iris al la pastro,
li iris al ŝerif'
Ĉiam kun la sama mesaĝ'
Vendu ĉiujn juvelojn kiel
donaco al malriĉul'
Do la homoj gvidis Jesuon al Sia tomb'

Laboristoj en la urb'
ĉirkaŭis Jesuon
kaj kredis la mesaĝon de Li
Sed bankistoj kaj pastroj
najlis Lin al kruc'
La homoj portis Jesuon al la tomb'

Nun la laborist' popol'
ĉirkaue sekvis Lin
Kantis kaj kriis kun ĝoj'
Sed policistoj, soldatoj
najlis Lin en l' aer'
Kaj homoj portis Jesuon al la tomb'

La spiron tenis homoj
aŭdante pri Lia mort'
Ĉiu miregis, kial?
Estis grava riĉul,
soldatojn rekrutis li
Ili najlis Jesuon al la ĉiel'

Tiu kanto fariĝis
en Novjorka Urbo
respondecis riĉulo, pastro kaj sklav'
Se Jesuo same predikus
kiel en Galilej'
Homoj kondukus Jesuon al Sia tomb'

# Movadaj Novaĵoj

– Ĉu mi rajtas memorigi vin pri Esperanto-Tago je la 26a de Julio? Tio estas la naskiĝtago de la internacia lingvo:) Nia celo estas informi la eksteran mondon pri la neceso solvi la lingvan problemon pere de la uzo de neutrala, nenacia lingvo, nome Esperanto. Nia slogano estas "justa komuniko" kio kongruas kun la temo de la UK en Islando. Mi esperas, ke vi povos helpi per informo al la ekstera mondo pri Esperanto: ekzistas afiŝoj por via tuja uzo en 65 lingvoj. Bonvole klaku sur la suban ligilon kaj uzu en universitatoj, bibliotekoj kaj lokaj butikoj. http://uea.org/vikio/Proponataj_simboloj_por_la_jaro_2013 Multaj homoj jam uzis en siaj fejsbukaj profiloj. Kore salutas kaj dankas. *– Brian Barker, Komisito*

– Restas lokoj, chi-somere, en la staghoj de Kulturdomo de Esperanto. En agrabla regiono Anjhuo, kastelo Greziljono proponas al vi praktiki Esperanton kaj ofertas varian programon: turisma, artamatora, alternativa, festa, teatra semajnoj... inter la 6a de julio kaj la 17a de augusto. Informojn kaj aligheblecon vi trovu en nia retejo: http://gresillon.org/somero. *– François Lo Jacomo*

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – ***Vaka***
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas**
**je 7 p.t. en la Suda**
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

23an de Julio – Kunsido omaĝe al Gertrude Novak

27an de Julio (Sabato) – Diservo je memoro de Gertrude Novak, 11:00, Our Lady of Mount Carmel Preĝejo, 708 W. Belmont Ave., Chikago, IL

27an de Aŭgusto – UKdEo en Rejkjaviko